50 JAROJ DA ESPERANTISTA VIVO

Sabadell 1950. Post longa ĉesado de ĉiuj E-aj aktivaĵoj pro civila milito kaj ĝiaj konsekvencoj, unua postmilita E-a kurso okazis en la ekskursa societo "Terra i Mar".
Inter la 50 partoprenantoj ĉeestis junulo kun naskiĝantaj, kaj estonte famaj, lipharoj. Li fakte estis la plej juna lernanto el la kursanoj. Pro lia kutimo ĉiam kunporti sian plumbobazan inkujon al la kurso, la aliaj lernantoj logike alnomis lin laŭ la nomo de tiu objekto. Tial li fariĝis "inkujo".
Kiel li sciis pri la E-o? Ĉar filo de Jaume Folch, unua postmilita prezidanto de E-fako de "Terra i Mar",. lernis kun li en gimnazio kaj informis lin pri la internacia lingvo. Iutage li vidis afiŝon kiu anoncis kurson de Eo. Ĉar aliĝdato jam pasis, li rapide kuris ĝis la lernejo kaj lian aliĝon oni ĝustatempe akceptis. Aliĝkotizo kostis tiam 25 ptojn kaj la instruisto nomiĝis...Jaume Viladoms.
En la sama jaro 1950, post fino de la kurso kaj kiam li estis 17-jara, li fariĝis "helpvoĉdonanto" en la estraro kaj promociis al posteno de sekretario la sekvontan jaron. Poste, en 50 jaroj da E-a vivo, li kolektis postenojn en la Sabadell-a kaj en la E-a kataluna asocioj ĝis tiu punkto ke li simple fariĝis "la vizaĝon" de E-o en Sabadell kaj en Katalunio.

"Inkujo" nun estas 67-jara grizharulo kaj grizlipharulo. Tiun lastan 6an de Oktobro mi intervjuis lin, aŭ pliĝuste, ni dise babiladis pri tiuj 50 jaroj. Jes, Llibert Puig, kies identecon vi verŝajne jam divenis, movadumas de 50 jaroj en la nuna jaro 2.000.

Kiam li ekesperantistiĝis, tempo malsimilis, distraĵoj malabundis kaj E-o vere reprezentis unikan eblecon eskapi kaj kontakti kun la ekstera mondo, t.e. ĉefe kun la libera mondo. Tio grave allogis lin sed krome li tre rapide elektis alian "movadan" mision: restarigi katalunan E-an movadon kies antaŭmilita brilo estis malfacile retrovebla.
Mejloŝtonaj paŝoj en tiu direkto okazis en 1957 kiam oni eldonis unuan bultenon de la sabadellaj E-istoj kaj kiam oni organizis la unuan renkontiĝon de katalunaj E-istoj. Ĉefan rolon en ambaŭ paŝoj havis Llibert Puig.
Inter 1957 kaj 1975, E-istaj renkontiĝoj (tiam nomataj "Aplecs") nur estis permesataj sub etikedo "Barcelonprovinca E-a Renkontiĝo". Kaj eĉ se efektive partoprenis al ĝi E-istoj el ĉiuj partoj el Katalunio, nur estis en 1975 kiam tiuj renkontiĝoj povis denove esti baptitaj "Kataluna E-ista Renkontiĝo".

Iom post iom restariĝo de la kataluna movado realiĝis.
Pri la asocio, la paŝoj ankaŭ estis eĉ pli malrapidaj. Inter 1950 kaj 1980, nuraj permesataj asocioj estis lokaj kluboj kaj "Kataluna E-o Organizo" nur tagiĝis en 1980. Kiel kunfondinto, Llibert memoras pri la momentoj kiam katalunoj ekpensis elstarigi tian asocion. En la sepdekaj jaroj, estis tro frue ekpensi pri tio, la situacio ne sufiĉe maturiĝis. En 1980, kiam la kataluna asocio finfine oficiale fondiĝis, E-istoj preferis eviti repreni malnovan nomon "Kataluna E-a Federacio". Tiu nomo povis ŝajni tro simila kaj tial tro konkurenca al tiu de H.E.F., la hispana federacio, kiu ne renkontis tiom da malfacilaĵoj kiom la kataluna por normale refunkcii dum la postmilita periodo. Krome tiu nomiĝo de K.E.F. aludas al la ebleco inviti aliajn grupojn el aliaj teritorioj partopreni en la asocio, kaj temis evidente pri tabua afero. Logika sekvo de tiu restarigo estis organizo de Kataluna Kongreso. Provincaj kaj katalunaj renkontiĝoj okazis, kiel oni vidis antaŭe, sed "Kongreso", kiel oni nomis tion antaŭmilite, ankoraŭ ne reaperis. Tiu decidiga paŝo okazis en Sabadell en 1983. Kiel Llibert rememoras kun evidenta plezuro, Sabadell ĉiam estis kerno de kataluna E-a vivo. En 1910, okazis fondiĝo de KEF kaj unua Kataluna Kongreso de E-o en nia urbo. Iniciatinto de tiuj 2 eventoj, kreiĝo de K.E.F kaj organizo de unua kongreso, estis sabadellano, Domènec Serdà i Simó, kiu bedaŭrinde mortis tre juna (27-jara).
En 1979, unua postmilita demokrate elektita urbestro Farrès permesis la reakiron de la nomo Zamenhof por la ĉefa avenuo kiu ankoraŭ nun havas tiun nomon, (ĝi estis perdinta ĝin dum la diktaturo). Kvar jarojn poste, sekvante tiujn historiajn paŝojn, la urba Konsilantaro de Sabadell tre favoris al organizo de la unua postmilita kataluna kongreso de E-o en sia urbo. Sendube temis pri unu el la plej sukcesaj kongresoj laŭ partoprenantaro kaj entuziasmo.En tiu epoko menciinde ankaŭ estas donaco far gesinjoroj Criach.Galbany de sidejo al la Sabadellaj E-istoj (fakto kiun ni pritraktis en nia lastjara bulteno).
En la 80-aj jaroj lernantoj de Llibert, t.e. gejunuloj kiuj sekvis E-an kurson en C.E.S trakuris Eŭropon de Internaciaj Junularaj Kongresoj al Internaciaj Seminarioj. Rekorde estis kataluna partopreno al la I.J.K. de

Zagreb en 1988. 42 gejunuloj el Katalunio partoprenis ĝin, grandparte sabadellanoj.
Kiam mi demandas al Llibert ĉu li ne nostalgias pri tiuj sukcesaj momentoj, li respondas filozofe ke eble oni povas bedaŭri ke la nuno ne similas al la hieraŭo sed li ĉiam estis kaj daŭre estos ĝisosta optimisto. Se li elreviĝas pri io, li facile forgesas kaj rapide fiksas novajn celojn. Inter la bedaŭroj kiujn li havas estis tamen unu kiu estas malfacile forviŝebla: skismo inter la sabadellaj E-istoj, skismo kiun li komprenas sed pri kio li diras post tiom da jaroj: "estas ŝoka afero por la neesperantistoj de Sabadell. Mi sincere deziras ke ni denove unuiĝu".
Nun, preterlasante la pasintecon li turnis sin al la novaj teknologioj. Pensiulo, li familiariĝis kun Internet kiun li regule uzas por Esperantumi kaj movadumi. Li ekzemple nun uzas ĝin por korespondi kun la prezidanto de la malta E-a asocio, kiun li persone konis ĉisomere.
Pri emeritiĝo, kiun li atingis antaŭ kelkaj jaroj, li asertas ke ĝi ne radikale modifis sian E-an vivon. Dum jarcentduono da E-a vivo li havis diversajn estrarajn postenojn en E-aj asocioj, kaj estis speco de "eterna butrokrato" kiel li mem difinas sin. Li foje bedaŭras ne povi ĝui la kongresojn de ekstere ĉar li ĉiam respondecis pri ilia organizo. Foje li plendas pro helpomanko de aliaj E-istoj. Sed, kiel li rekonas "se mi havas amarajn spertojn, mi tre facile forgesas ilin. En mia E-a vivo, mi devas bilanci la tuton kaj esti "eterna burokrato" certe utilis kaj utilas al la movado". Tio estas la ĉefa konsolo por mi.
Cetere lia multflanka respondeco kape de CES kaj KEA ne malhelpis lin travivi ĝojindajn kaj gravajn personajn momentojn. Memorinda estas por li lia unua korespondanto, Petro Dickstejn, polo kiu formigris al Australio dum la dua mondmilito kaj kiu vizitis "inkujon" en Sabadell en 1951. Llibert korespondis kun li ĝis lia morto. Ĝuinde estis lia unua partopreno en eksterlanda Universala Kongreso en 1973 en Belgrado. Iom odisea ĝi fakte estis pro veturila paneo en Austrio kio devigis la familion, 2 gepatrojn kaj 4 gefilojn, halti tie dum kvin tagoj sed la sperto restas entute neforgesebla. Kaj laste sed ne malpli grave estas fakto ke tuta familio Puig, "nerekte kaj nedevige" - insistas nia prezidanto - kontentige esperantistiĝis tra internaciaj kontaktoj kaj de kelkaj jaroj eĉ aperis tria generacio de Puig-aj E.istoj. Jen kelkaj ekzemploj de personaj kontentiĝoj preter la movadaj sukcesoj. Llibert

honeste aldonas ke "ĉio-ĉi certe ne eblus sen la anĝela pacienco de mia edzineto Carme kiu ĉiam akceptis kaj subtenis mian tempoprenigan hobion. Mi neniam povos sufiĉe danki ŝin pro tio"
Kaj ni neniam povos sufiĉe danki al Llibert pro lia sindediĉo, entuziasmo, persistemo kaj nedetruebla optimismo. Verŝajne kaj maljuste lia nomo ne aperos en la analoj de la movado ĉar lia laboro tro ofte restas anonima sed estas li kiu de multaj jardekoj ebligas eldonojn, kongresojn, kursojn kaj ĉion kio vivtenas E-on en Sabadell kaj en Katalunio. Dankon Llibert kaj restu "inkujo" ĝis la lasta momento. Tiel vi plaĉas al ni.

Éric